Internacia Kongresa Universitato

En Fortalezo okazos la 55-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ personoj kun simila kvalifiko. Ili estas invitataj sendi siajn prelegproponojn al la sekretario de la IKU-komisiono, **prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio; maitzen@astro.univie.ac.at)**. La propono enhavu: koncizan resumon de la prelego (ĉ. 200 vortoj maksimume); koncizan biografion kaj personan bibliografion. Necesas aldoni ankaŭ foton taŭgan por publikigo. La prelegoj prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo "Diverseco: ŝanco, ne minaco". La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honorarion, sed ne repagon de siaj kostoj. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj aŭ tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU. **Limdato por kandidatiĝo: 15-a de januaro 2002.**